


BRAZILA ESPERANTISTO

79-a Jaro

Jul-Sep 1985

N-ro 286

21-a Brazilia Kongreso de Esperanto



17-21 Julio 1985
Belo Horizonte

Jul-Sep 1985

79-a Jaro

N-ro 286

Brazila Esperantisto
("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo,
societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto n-ro 4.356, 26/10/1921

Respondeca Direktoro: Fernando Marinho
Redaktoroj: Luiz A. B. Martins kaj Joel Manso

Administracio kaj Redakcio
Praça da República, 54 - 2º
20211 - Rio de Janeiro, RJ, Brazilo

Senpaga por anoj de B.E.L.
Eksterlande: 20 respondkuponoj

**LIGA BRASILEIRA
DE ESPERANTO**
Balanco 1984

ATIVO

Disponível

Caixa	307.964
Bancos c/movimento	1.641.714
Caderneta de Poupança	1.249.879

Realizável

Devedores diversos	1.359.486
Devedores p/ R. Postal	508.616
Livros	4.653.879
Ações	2.206

Imobilizado

Biblioteca	6.830
Móveis	65.770
Máquinas	29.210
	<u>9.825.554</u>

PASSIVO

Exigível

Credores Diversos	4.165.800
-------------------	-----------

Pendente

Anuidades antecipadas	899.000
-----------------------	---------

Não exigível

Patrimônio	4.760.754
	<u>9.825.554</u>

Aloisio Sartorato
Tesoureiro

Fernando Marinho
Presidente

Liga Brasileira de Esperanto

**Quota anual de adesão
1985**

M S categoria destinada aos que não são esperantistas mas simpatizam com o movimento; o sócio tem direito a utilizar a Biblioteca e o serviço de livros, participar das atividades sociais e receber os boletins editados pela Liga. Inscrição:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 7.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 15.000

M 1 categoria destinada àqueles que já estão integrados no movimento esperantista; recebe o mesmo que o M S. Inscrição:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 21.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 45.000

M 2 tem os mesmos direitos que o M 1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento. Inscrição:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 63.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 135.000

D M categoria destinada àqueles que desejam integrar o quadro social da Liga na qualidade de Membro Vitalício. Paga a importância correspondente a 30 vezes o valor da quota M 1. Tem os mesmos direitos que o M 2. Pagamento:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 630.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 1.350.000

Todas as importâncias devem ser remetidas, em cheque pagável no Rio de Janeiro, ou vale postal, em nome da Liga Brasileira de Esperanto: Praça da República, 54 2º andar, 20.211 - Rio de Janeiro, RJ.

Curso por Correspondência

A Liga Brasileira de Esperanto mantém os seguintes cursos por correspondência: básico, de aperfeiçoamento, superior e magistral.

Taxa de inscrição:

- a) até 28.02.85 Cr\$ 28.000
- b) após 01.03.85 Cr\$ 60.000

A taxa de inscrição é a mesma para todos os cursos.

Os cursos são privativos dos sócios da Liga.

A inscrição para os cursos por correspondência poderá ser feita em qualquer época do ano.

RAPORTO DE LA ESTRARO RILATA AL 1984

Estimataj Samideanoj,

Laŭ la Statuto, ni prezentas al vi la Raporton de la Estraro rilatan al 1984.

1. *Estraro kaj Konsilantaroj.* Dum la jaro 1984, okazis neniŭ ŝanĝo en la Estraro, kiu konsistas el jenaj nomoj: Prezidanto: Fernando Marinho; Vicprezidanto: Floriano Pessoa; Ĝenerala Sekretario: Luiz Alberto Martins; Unua Sekretario: Joel Manso; Dua Sekretario: Valéria Santiago; Kasisto: Aloísio Sartorato.

Rilate al la *Konsultiĝa Konsilantaro*, okazis nur unu ŝanĝo pro la neatendita forpaso de nia karmemora D-ro Braz Cosenza, kiu estis anstataŭita de D-ro Álvaro Fausto de Souza. Jen la listo de la konsilantoj: Álvaro Fausto de Souza (RJ), Carlos A. S. Cunha (SP), Francisco Barbosa Filho (CE), Geraldo Mattos (PR), Ivo Sanguinetti (RS), Ivon Barbosa (SP), Jannes M. Mabesoone (PE), José Passini (MG), Leopoldo H. Knoedt (BA), Sírío Silva (RJ), Walter A. Francini (SP), Walter Boppré (SC).

Kontrolo Konsilantaro. Jorge de Oliveira, Mário Ritter Nunes, Sylla Chaves.

2. *Sekretariaj Servoj.* En 1984, estis ekspeditaj 471 leteroj; 68 fakturoj, 1026 enspezoj, 126 rembursoj enspezoj, 19000 ekzempleroj de *Esperanto Notícias*, 12000 ekzempleroj de *BEL-Infomas*, kaj 4000 ekzempleroj de *Brazila Esperantisto*, 4000 prospektoj kaj aliĝiloj. Entute pli ol 40000 sendaĵoj.

Krom la estraranoj mem kaj la dungita junulo Ronaldo de Oliveira, aktivis en nia sidejo, kiel volontuloj jenaj amikoj: José Rabelo de Paula, Elma do Nascimento, Arnaldo Lara, Armando Lara, Manoel Lara, Lair Iotti Lara, Mônica Gomes Boller, Givanildo Ramos da Costa, Ricardo França, Alfredo Aragón Guerrero, Elina Guerrero, Mário Ritter Nunes, Jurguy Scherpel.

Ni kalkulis kun la laboro de pluraj aliaj sindediĉaj amikoj, kiuj plenumis specifajn taskojn ekster la Ligo, kiel ekzemple Ruy Albuquerque, Sylla Chaves, May Bijeleveld, José Bonifácio, Jorge Campos de Oliveira kaj aliaj.

3. *Membraro.* Fine de 1984 estis enskri-

bitaj 509 membroj kontraŭ 472 en 1983 kaj 425 en 1982:

	1982	1983	1984
MS	226	288	300
M1 oo	143	135	147
M2	31	23	24
DM	23	30	34
BM	2	2	4
	425	478	509

4. *Perado. U.E.A.* — En 1984 malkreskis la kvanto da individuaj membroj, kiuj pagis siajn kotizojn pere de B.E.L., ne nur pro la inflacio kaj pro la postuloj koncernaj al sendado de mono eksterlanden sed pro tio, ke aliaj institucioj kaj privatuloj sukcesis trovi manieron ankaŭ peradi por U.E.A. Aliflanke la situacio de Aligitaj Membroj pliboniĝis. La fina rezulto, laŭ kvanto da membroj, estas pozitiva. Jen la ciferoj:

	1983	1984
MJ	7	3
MJ (K)	4	4
MA	141	65
MA (K)	17	3
IM	169	75
AM	130	220
AM (J)	77	89

En 1983, IM + AM = 376; en 1984, 384.

Heroldo — Dum 1984, B.E.L. peradis por *Heroldo de Esperanto*, sed la kvanto da abonantoj estis relative malalta: 19 abonantoj.

El Popola Ĉinio — B.E.L. peris 45 abonantojn dum 1984.

5. *Kursoj. Diplomoj.* Regule okazis kursoj en klaso kaj per korespondado. Jen la komparo inter la kvanto da diplomoj aljuĝitaj de B.E.L. dum la du lastaj jaroj, laŭ niveloj:

	1983	1984
Baza	59	84
Progresiga	16	57
Supera	11	07
	86	148

Kursgvidantoj: Celso Martins, José Bonifácio, May Bijelefeld (Baza kaj Progresiga); Jorge Campos de Oliveira (Supera); Flóriano Pessoa (Supera kaj Profesora).

6. *Periodaĵoj*. Aperis 4 numeroj de "Brazila Esperantisto", 13 de "Esperanto Notícias", 8 de "B.E.L. Informas". Luiz Alberto Martins respondicis pri "Brazila Esperantisto" kaj Aloisio Sartorato pri la ceteraj periodaĵoj.

7. *Eldona Agado*. En 1984, estis eldonitaj de B.E.L. jenaj verkoj: 4-a eldono de "Vocabulário Port-Esp/Esp-Port, de Carlos Domingues; diskoj: "Paco, Amo kaj Naturo", "Kantu kaj Lernu n-ro 3", "La Bufo", ĉiuj verkitaj de Sylla Chaves; libretoj: 3 didaktikaj kantaroj, de Sylla Chaves.

8. *Societaj Kunvenoj*. Okazis du ĝenerallaj kunsidoj, pluraj sabataj kulturkunvenoj kaj jenaj prelegoj: en Majo: "Zagreba Metodo", (Ivica Spoljarec-Štef); en Junio: "Hodiaŭa Jugoslavio" (Ivica Spoljarec-Štef); "Universaleco de U.E.A." (Victor Sadler); en Oktobro: "Delegita Reto de U.E.A." (Ivon Barbosa); en Decembro: "Zamenhof kaj sia verkaro" (Paulo Sérgio Viana). Krom ĉi tiuj prelegoj, okazis la lanĉo de la disko "La Bufo" de Sylla Chaves kaj prezentado de du aŭdvidaj programoj.

9. *Renkontiĝoj*. B.E.L. sendis reprezentantojn al jenaj kunvenoj: III-a Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto, en Florianópolis (Carlos A. S. Cunha), I-a Semajno Spiritista-Esperantista, en Rio de Janeiro (Celso Martins), Inaŭguro de Kurso ĉe A.A.B.B., en Rio de Janeiro (Fernando Marinho), Solenaĵo ĉe Niterói Esperanto-Klubo, la 15-an de Decembro (Aragón Guerrero).

10. *Kongreso*. Kiel elstara okazaĵo dum la pasinta jaro ni mencias la 20-an Brazilan Kongreson de Esperanto, kies ĉeftemo estis Integriĝo en la Brazilan Esperanto-Movado. Aŭspiciis tiun Kongreson B.E.L., K.K.E. kaj B.K.E. Al Esperanto-Asocio de São Paulo kaj al la diligentaj samideanoj el la Organiza Komitato la brazila esperantistaro ŝuldas la plej sinceran dankon.

11. *Finanĉa Raporto*. El la Finanĉa Raporto, kiun nia kasisto Aloisio Sartorato prezentis al vi, vi konstatis, ke la finanĉa

situacio estis kontentiga.

12. *Finaj Vortoj*. Jen estas la Raporto de la Estraro, kiun ni redaktis fine de Decembro 1984. Kompreneble ĝi estas konciza, sed ni estas al via dispono por ia ajn klarigo. Sed permesu, ke ni aldonu al la Raporto la saĝajn vortojn de samideano Renée Triolle, ĝenerala sekretario de Unuiĝo Franca por Esperanto, publikigitajn en la revuo "Franca Esperantisto", Majo-Junio 85. La tri lastaj vortoj de la sekvanta teksto anstataŭas la vortojn "Unuiĝo Franca por Esperanto".

"Jes, sinjoro, la loko de la internacia lingvo, kiu celas rilatigi la homojn sen interveno de tradukisto, liveri al la tuta homaro kulturilon, kaj fariĝi ĉies komunikilo estas pli alta, pli elstara, pli originala ol ejo por amikaj bankedoj, fiŝkaptado aŭ pilkludado... Mi plene konsentas kun vi, kaj estas skandalo, ke de cent jaroj Esperanto vivas nur kadre de asociaj rondoj. Sed... ĉu vi iam pripensis, kiu eldonas la afiŝojn, kiujn vi bezonas, la informilojn, pri kiuj vi sopiras, la lernolibrojn, kiujn vi aĉetos, la literaturajn verkojn, kiujn vi propagandas? Ĉu vi iam eskapis la tipan demandon de ĵurnalisto/oficialulo/naivulo: "Kiom da vi estas?" Kion respondi? La sola taksebla cifero estas la nombro da membroj, da aliĝintoj, da abonantoj! Ĉu vi iam pripensis, kiu eliros Esperanton el tiu asocia rondo, se ne ekzistas organizita agado ĉe sciencistoj, politikistoj, universitatanoj, amaskomunikiloj por argumenti, ke Esperanto estas "normala" lingvo? Ĉu vi, en via kampara loko, havas sufiĉe da talentoj kaj da tempo por konviki la tutan mondon, ke Esperanto funkcias, kiel normala vivanta lingvo? La mondo ne kontentiĝas pri onidiroj; ĝi bezonas pruvojn; kaj ĝis la sonĝa momento, kiam la lingvo disvastiĝos tra la aero, sen helpo de esperantistoj aŭ de funkciuloj, necesas prepari dosierojn. Kaj ĉu vi tion faras?

"Sekve, mi preferas labori kadre de serioza asocio, ĉar tiamaniere miaj ideoj, energio kaj tempo ne estas perditaj. Ili profitas ne nur min egoiste sed aliajn homojn. Kaj pro tio mi estas membro de asocio, pro tio mi invitas miajn konatulojn, kiuj ankaŭ parolas Esperanton aliĝi al nacia asocio, kia estas Brazilan Esperanto-Ligo."

Fernando Marinho
Prezidanto

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Relatório Financeiro 1984

Senhores Associados,
De acordo com o art. 15 dos Estatutos Sociais, apresentamos a V.Sas. o Relatório Financeiro, referente ao exercício de 1984.

A programação financeira do exercício em questão foi determinada pela Proposta Orçamen-

tária apresentada pela Diretoria em Assembléia Geral de 20 de outubro de 1983 e aprovada integralmente pelos associados presentes.

Após o registro dos atos e fatos administrativos ocorridos em 1984, chegou-se ao resultado que ora apresentamos abaixo:

DEMONSTRATIVO DA DESPESA E DA RECEITA

	Proposta	Realizada	%
Despesa			
<i>Pessoal</i>			
Salários	2.216.000	1.445.246	16,70
Previdência Social	601.000	226.996	2,62
FGTS	162.000	128.789	1,49
PIS	21.000	8.298	0,10
	<u>3.000.000</u>	<u>1.809.329</u>	<u>20,91</u>
<i>Material</i>			
Material de Consumo	600.000	1.352.910	15,63
<i>Serviços de Terceiros</i>			
Edições Diversas	900.000	2.523.500	29,17
Franquia Postal	600.000	1.182.720	13,67
Reparos e Conservação da Sede	—	660.600	7,63
Telefone	300.000	303.535	3,51
Força e Luz	150.000	128.171	1,48
Despesas Diversas	<u>450.000</u>	<u>692.628</u>	<u>8,00</u>
	<u>2.400.000</u>	<u>5.491.154</u>	<u>63,46</u>
Total da Despesa	6.000.000	8.653.393	100,00
Superávit		3.284.687	
Total Geral		11.938.260	
Receita			
<i>Ordinária</i>			
Anuidades	2.640.000	4.332.350	36,29
Donativos	<u>360.000</u>	<u>318.554</u>	<u>2,67</u>
	<u>3.000.000</u>	<u>4.650.904</u>	<u>38,96</u>
<i>Extraordinária</i>			
Serviços de Cursos	900.000	2.330.800	19,52
Serviços de Livros	1.800.000	2.331.132	19,53
Comissões	240.000	400.373	3,35
Congressos	—	1.106.446	9,27
Aplicações Financeiras	—	774.438	6,49
Receitas Diversas	<u>60.000</u>	<u>344.167</u>	<u>2,88</u>
	<u>3.000.000</u>	<u>7.287.356</u>	<u>61,04</u>
Total da Receita	6.000.000	11.938.260	100,0
Total Geral		11.938.260	

Análise dos Resultados

O exame do "Demonstrativo da Despesa e da Receita" do exercício de 1984 revela um *superávit* da ordem de Cr\$ 3.284.867.

Comparando-se as cifras relativas ao Orçamento aprovado para esse ano e o resultado final apu-

rado, constata-se, inicialmente, que o Orçamento previsto foi ultrapassado em Cr\$ 5.938.260. Isso se deve, sem dúvida, de um lado ao bom desempenho de algumas contas da Receita e, por outro lado, na parcimônia por ocasião da realização de

RECENZO

Zé do Burro (Nouvelles Mémoires d'un Âne ou Malheurs de Sophie) — *Satana Anĝelo*, G.R. Ledon. Eldono de la Aŭtoro por S.A.T. Kovrilo de Flávio Floriano de Moraes. Kompostita de Fonto, 1984.

La verko konsistas el 23 ĉapitroj, 11 verkitaj en la franca lingvo, 8 en la portugala kaj 4 en Esperanto. En "Kompletiga Suplemento" aperas en Esperanto la originalaj tekstoj verkitaj en la Franca kaj Portugala lingvoj.

La centra figuro Zé do Burro-Anĝelo estas jen naiva, simpatia, optimista, jen sarkasma, mokema, ironia, pesimista.

La aŭtoro traktas pri diversaj temoj: la vivo, la morto, Dio, la socio, politikistoj, la amo k.t.p. *Zé do Burro-Anĝelo-Aŭtoro* eksterigas sian nekonformismon pri mondo starigita surbaze de superstiĉoj, antaŭjuĝoj, religio, falsa moralo, fine pri ĉio, kio konsistigas la homan personecon.

Kvankam la pesimismo vidiĝas en diversaj lokoj de la verko, ni sentas, ke la aŭtoro volas per denuncio-akuzo veki ĉe la legantoj la superajn moralajn principojn ekzistantajn kelkkaze burĝone en ĉiu homo.

Jen verko por meditado.

L.A.M.

despesas.

Do lado da Receita, temos a destacar o ingresso de "Receitas não Previstas", como as de "Congressos" (Cr\$ 1.106.446) e as de "Aplicações Financeiras" (Cr\$ 774.438). Outrossim, cabe assinalar o excelente desempenho das Receitas oriundas de "Anuidades" (Cr\$ 4.332.350) e de "Serviços de Cursos" (Cr\$ 2.330.800).

Do lado da Despesa, cumpre informar que o resultado das "Despesas com Pessoal" ficou muito aquém do previsto, tendo em vista a saída da funcionária, cujo salário era em torno de dois salários mínimos mensais, e sua substituição por outro funcionário, cujo salário é de um salário mínimo mensal.

Finalmente, no Balanço da Liga, que adiante transcreveremos, verifica-se a boa situação financeira da Instituição, onde um "Passivo Exigível" da ordem de Cr\$ 4.165.800 é garantido pela existência de um Ativo da ordem de Cr\$. . . . 9.723.744 (Realizável + Disponível).

Aloisio Sartorato
Tesoureiro

Por pli bona lingvoscio

En "S.A.T. - Amikaro", Julio 1983, aperis artikolo sub la supra titolo verkita de D-rino Marjorie Boulton. La artikolo estas plena de konsiloj kaj instruoj, kiujn ni devas legi kaj relegi, ĉar ĝi tuŝas ĉiujn kampojn de la lingvouzo.

Komence D-rino Boulton asertas, ke "ni ĉiuj povas plibonigi nian lingvoscion", ĉar "talentoj kreskas, kiam ni kultivas ilin. Se ni serioze ŝatas Esperanton, ni havu etan sloganon: *Ni ne estu nur samideanoj; ni estu samlingvanoj!* Ĉar Esperanto estas ne nur bona ideo, sed riĉa, bela kaj interesa lingvo."

La aŭtorino diras, ke estas vere, ke Esperanto estas tiel facila, ke 2 komencantoj povas frue ĝui simplan korespondadon. Se komencanto faras kelkajn eraretojn, ne tre gravas; pli bone utiligi la lingvon, eĉ neperfekte, ol ne utiligi ĝin. Sed jen averto: du diverslandaj komencantoj ne faras la samajn erarojn!

Al komencanto estas devo de sperta Esperantisto montri paciencon kaj indulgemon, iom helpi, sed ne tre konstante korekti, "ĉar humiligita homo malfacile lernas". Al la "eternaj komencantoj", tiuj, kiuj dum jaroj faras la samajn elementajn erarojn, ŝi emas diri: "ĉiu devas iam komerci, sed neniu rajtas ĝismorte komencadi!"

Por simplaj amikaj rilatoj, la aŭtorino konsilas "bonege regi la esencan gramatikon, disponi pri la vortoj, kiujn ni bezonas por niaj interesoj komunaj kaj por la ĉiutaga vivo, kaj kompreneble posedi konsultlibron, por serĉi ion alian."

Ŝi opinias, ke se oni volas vere servi al Esperanto, oni devas elekti laborkampon aŭ laborkampon, kiuj taŭgas al la temperamento kaj talento kaj cirkonstancoj.

En tiu parto de la artikolo, D-rino Boulton donas liston da konsiloj. Jen ili:

a) Por instruado de Esperanto. Oni nepre porluru sian lingvoscion. Estas vera misfaro instrui erarojn. Bona instruisto ankaŭ povas doni konsilojn pri lernolibroj, vortaroj, legolibroj; devas multon scii, ne nur pri Esperanto, sed pri instruado; se eble ĉeesti ian kurson pri la metodo Cseh pro ties utilaj ideoj pri instruado de diversaj punktoj; studi diversajn lernolibrojn; informiĝi detale pri la eblecoj de Esperanto por infanoj; kaj legi valorajn librojn pri instrumetodo ĉefe la verkojn "Esperanto kaj Lernejo" kaj "Metodiko de la Esperanto-Instruado".

b) Oratoro. Nepre detale studu la verkon "Retoriko" de Ivo Lapenna. Studu bonajn paroladojn, ekzemple de Zamenhof, Lapenna, prelegojn de ekzemple Auld, Tonkin, Waringhien, en tekstoj aŭ sur sonbendoj. Ekzercu sin en elparolado, produktado de la voĉo, gesto, k.t.p.

c) Literaturo. "Por verki, oni bezonas edukitan lingvosenton, komprenon pri literaturaj rimedoj, grandan memdisciplinon, konstantan pensadon pri la legontoj. Oni devas pene lerni metion, per legado, ekzercado kaj eble precipe per memk-

ritikado."

ĉ) Aktoro. Tiu, kiu volas esti aktoro, ne sukcesos se li stumblos inter frazoj, misprononcos, ellasos akuzativojn, ne komprenigos la sencon de la paroladoj. Estas konsilinde aŭskulti diskojn aŭ sonbendojn (ekzemple, de Nikolaj Rytjokov) kaj ĉeesti prezentadojn en Esperanto.

d) Tradukado. Tiu, kiu deziras traduki naci-lingvajn verkojn en Esperanton, serioze kaj humile pripensadu la tradukan arton, "ĉar multaj ne tre bonaj tradukoj aperis en Esperanto. Bona tradukisto trovas la plej proksiman ekvivalenton, por redoni la formon de la verko, la precizan enhavon, laŭeble la detalajn nuancojn." Bona ekzerco estas kompari iun bonan tradukon kun la originalo, kaj detale esplori, kiel solviĝis diversaj problemoj. Inter tre bonaj tradukistoj troviĝas Waringhien, Bernard, Zamenhof, Kalocsay, Auld, Rosseti.

e) Helpi en la Esperanto-Movado kiel organizanto. Organizanto bezonas multajn malfacilajn virtutojn, kiuj ne rilatas al lingvoscio: laboremon, takton, toleremon, paciencon, kapablon, postvivi multajn seniluziigojn. Sed organizanto, kiu ne povas klarigi ion pri Esperanto al ĵurnalisto, prezenti prelegonton, danki preleginton, instrukcii klare aranĝon, skribi protokolon, prezidi kunsidon, verki raporton, bonvenigi kaj akompani eksterlandanon, ne povos esti tre utila. Ni tamen ne forgesu, ke iu tre simpla komo, kiu neniam eĉ plene komprenis la akuzativon, sed kiu volonte purigas la kunvenejon, bakas tortojn por festo, rondiras por liveri cirkulerojn, perlaboras monon por donaci ĝin al la societo, helpas paki librojn, k.t.p., povas esti tre utila samideano, kaj meritas dankon kaj estimon. Sed iu staru inter tiu bonkorulo kaj ĵurnalisto! La aŭtorino varme rekomendas al ĉiu esperantisto kaj speciale al serioza organizanto kaj propagandanto la verkon "Esperanto en Perspektivo".

Ni pardonpetas, ke ni devigis la legantojn legi resumon ne la artikolon mem; kulpas la spacoŝparo. Sed la dua parto de la artikolo estas tiel grava, ke ni plene represas ĝin. La legantoj frandu la stilon de D-rino Boulton!

Sekvas kelkaj ĝeneralaj konsiloj validaj por ĉiuj, eĉ por tiuj, kiuj nur deziras iom korespondi kaj renkonti alilandanojn.

Pro faktoroj en la psikologio de memoro, kaj lernoprocedoj, kvaronhoro da ekzercado ĉiutage pli bone efikas ol horo kaj tri kvaronoj ĉiun mardon. Ĉiu komencanto aŭ progresanto studu Esperanton dum almenaŭ dek minutoj ĉiutage, se nur per aŭskultado de sonbendo, dum vi razas vian barbon, aŭ aranĝas vian hararon. Ne kuraĝigu la

forĝesilon!

Ĉiu povas pripensi tri grandajn rimedojn, por plibonigi lingvoscion: 1-e, legu! — 2-e, skribu! — 3-e, parolu! Post multjaraj spertoj mi aldonas: 4-e, kontrolu! — 5-e, servu!

1-e. Legu!

la ajn legado pli helpas, ol nenia legado. Legado de facilaj malpezaj verkoj kutimigas nin al vortoj kaj lingvaj kutimoj; ni komencas iom pensi en Esperanto. Sed estas eĉ pli bone iom streĉi nin, foje legi ion iom malfacilan, serĉi la novajn vortojn, kaj rimarki novajn esprimrimedojn, eble noti la novajn sciojn.

Se Esperantistoj ne aĉetos librojn, ne estos eble eldoni; do, subtenu niajn verkistojn kaj eldonistojn kiel eble plej bone. Ili mune multe oferas, por pligrandigi nian fierindan literaturon. Sed ĉiu loka grupo devus havi sian etan bibliotekon; kaj en multaj landoj, diversaj publikaj bibliotekoj havas etan stokon de Esperantaj libroj, aŭ akiroj ĝin, se sufiĉaj homoj montras intereson. En Centro "Georges-Pompidou" oni trovas ne nur Esperantajn librojn kaj gazetojn, sed eĉ plurajn kursojn por la lingvolaboratorio.

Jen kelkaj aparte valoraj legaj laboroj:

- legu tradukon de verko, kaj komparu ĝin kun la originalo, rigardante la esprimrimedojn;
- laŭlegu ion — kompreneble dramo estas plej taŭga — en grupo; por laŭtlegi, oni devas ne nur vidi la tekston, sed rigardi ĝin; la komencanto lernas de aliaj; la sento de kolektiva laborado estas stimula kaj kuraĝiga; oni povas diskuti pri interesaj punktoj, kaj spertulo povas klarigi ion;
- legu, kaj notu pri via legado; ekzemple, resumu en Esperanto la enhavon de iu libro;

- ne forgesu legi la verkojn de Zamenhof, niajn modelojn; ofte li mirinde montras, kian klarecon kaj eĉ elegantecon oni povas atingi per tre malgranda vortostoko; sed ankaŭ legu ion aktualan, kie nuntempaj esploras nuntempajn stilojn, kaj uzas esprimrimedojn nun bezonatajn; "Sennaciulo" kaj "Monato" estas tre utilaj aktualaj gazetoj; ni pli ofte bezonas vortojn kiel "televideo", "atombombo", "komputero", "antibiotiko", "kserografio", kaj ekstereŭropajn vortojn kiel "ĝvano", "tatamo", "ĝnuo", "manioko", kiujn Zamenhof ne uzis, ol kelkajn vortojn, kiujn li elpensis, ĉar siatempe li bezonis ilin, kiel "vojevodo", "jesaulo", "vokto", "pudo"; ni tenu unu piedon en la historio, sed unu en la nuntempa mondo;

- kaj foje ni deturnu nin de romanoj kaj antologioj, gazetoj kaj dramoj, por relegi nian plej bonan gramatikon, aŭ por pli bone esplori nian plej bonan vortaron; mi mem konfesas, ke la legado, kiu nuntempe plej helpas min plibonigi mian lingvoscion, estas mia konsultado en "Plena Ilustrita Vortaro"; ĝi estas trezorejo ne nur de vortoj, sed de precedentoj kaj esprimrimedoj.

2-e. Skribu!

Faru ekzercojn el iu lernolibro, aŭ en iu kurso. Mi aparte rekomendas verkon de William Auld "Paŝoj al Plena Posedo"; jen vere pensigaj kaj interesaj ekzercoj. Skribu leterojn al plumamikoj,

TEATRO
de Machado de Assis

Kvar komedioj tradukitaj en
Esperanton.

0,24 ORTN

precipe al amikoj, kiuj ne scipovas vian nacian lingvon, tiel ke vi ne povos helpi vin per krokodilajoj. Skribante, ĉiam restu kiel eble plej konscia pri la ricevonto. Jes, vi komprenas vian leteron; ĉu Kŭame en Afriko aŭ Atuk en Groenlando komprenos ĝin?

Faru traduketojn, eble de iu amuza peceto el ĵurnalo, aŭ paĝo el favorata romano. Kiam mi skribas miajn proprajn pensojn, ni povas eviti ion speciale malfacilan; tradukado estas tre bona ekzercado, por devigi nin alfronti nian nescion. Sed ne tro rapide presigu tradukon; vi ne volas honti pri ĝi post ses monatoj.

3-e Parolu!

Ni ne lernos paroli flue en soleco kaj silento. Ni partoprenu en ia grupa vivo. Kaj estas grave, ke en ĉiu Esperanto-klubo, ĉiu eta grupo, la anoj parolu Esperanton dum almenaŭ granda parto de la tempo. Ideale, ni parolu nacian lingvon nur por certigi, ke veraj komencantoj komprenu ian gravan informon, ekzemple pri dato de kunveno, aŭ por klarigi ion, gramatikan punkton, novan vorton.

Se cirkonstancoj vere devigas al vi izolitecon, parolu almenaŭ al vi mem; eble korespondu per sonbendoj; konversaci iom telefone; plej bone, persvadu alian personon lerni kun vi!

Vi probable faros vastan progreson, se vi povos iri ien, kie vi devos paroli Esperanton — al SAT-kongreso, Universala Kongreso, faka kongreso — al amikoj, en lando, kies lingvon vi tute ne parolas. Se vi mem vere ne povas vojaĝi, eble vi povos gastigi aŭ landan Esperantiston.

Ofte estas utile, ke grupo havu ian difinitan ekzercon, kiun oni preparas; ekzemple: "ĉiu por tiu interesan objekton, kaj parolu pri ĝi" — "ĉiu donu recenzieton pri libro ĵus legita" — "ĉiu rakontu ŝercon" — "ĉiu rakontu pri stranga travivaĵo".

Ni ne forgesu, ke grava parto de konversacio estas aŭskultado; ni lernas ion, ne nur kiam ni mem parolas, sed kiam ni atente aŭskultas gekamaradojn, kaj kutimigas niajn orelojn al la lingvo. Kaj ni ne forgesu, ke tiu, kiu persiste parolas nacilingve en Esperantista rondo, ne nur malhelpas sian propran lernadon, sed malhelpas ĉies.

4-e Kontrolu!

Sen kontrolado, abunda ekzercado povas foje nur enradikigi erarojn en la kapo. Ni ofte ne scias, kion ni nescias. Antaŭ nelonge mi komencis skribi flormomon "iriso", sed feliĉe mi ne plene fidis mian memoron, kaj kontrolis en P.I.V. Jen, la floro estas "irido"; "iriso" estas ja Esperanta vorto, sed nomas parton de okulo! Bela estus bukado da "irisoj", "rosmaroj", "alizeoj" kaj "fritilaroj", ĝis oni pli atente rigardis en vortaro; ĉu ne?

Mi estas akademiano, kiu jam aperigis 11 librojn en Esperanto. Mi ĵus finverkis legolibron — "Faktoj kaj Fantazioj" — ĉirkaŭ 100.000-vortan. Sentante specialan devon ne instrui erarojn al lernantoj, mi kontrolis en P.I.V. la precizan signifon, la ĝustan uzadon de ĉirkaŭ ĉiu dudeka, foje ĉiu deka, vorto; do de almenaŭ 5.000 vortoj. Tiel mi, kiu iom scipovas Esperanton, tamen savis min

kaj miajn legantojn de eble 300 eraretoj (Kiam mi verkas eĉ en la Angla, mi foje kontrolas ion en vortaro). Do, ni ĉiuj kontrolu en vortaroj, se eble en P.I.V., sed se ne, almenaŭ en tre bona "Plena Vortaro" kun "Suplemento", en nacilingvaj vortaroj, kaj foje en libroj pri gramatiko. Granda parto de progreso en iu ajn fako estas ia malfido pri nia propra scio, do ia preteco ankoraŭ lerni.

Kaj ni memoru, ke kvankam estas necese, ke nia lingvo kresku kaj evoluu, samtempe — precipe por internacia lingvo — estas tre grave akcepti kaj uzi normojn, havi unuecan uzadon tra la mondo. Ni ne donu sencon al tiu konata senseca argumento, ke Esperanto disfalos en dialektojn.

5-e Servu!

Ni pli bone lernas nian lingvon, kiam ni servas ĝin. Laborante por ĝi, ni trovas ĉiam freŝajn motivojn, por pli kaj pli esplori ĝin. Talentoj varias: unu instruu, alia propagandu, unu organizu grupan bibliotekon, alia kantu en koncerto, alia traduku; sed ĉiu povas trovi ian personan kapablon fari ion utilan. Kaj la neceso uzi la lingvon por praktikaj celoj, aŭ defendi ĝin kaj klarigi pri ĝi, devigas nin ellerni ĝin.

Iom nelerta propagando, aŭ troa optimismo de lernanto, foje miskomprenigas la tute veran aserton, ke "Esperanto estas facila"; ne kiel lekadado de glaciaĵoj! Ĝi estas facila lingvo kompare kun naciaj lingvoj; ĝi estas miraklo de facileco: logiko, fleksebleco, konsekveneco, libereco; ĝi levas facilecon al la nivelo de la estetika kvalito, ia unika beleco. Sed ĝi ne estas ia limigita kodo de utilaj frazoj, sed plene vivanta moderna lingvo, kaj multe tro valora, por ne postuli ian penadon. Sed, dum, en multaj lingvoj, parkerigendaj konjugacioj kaj miloj da anomalioj nenecesaj tedas nin, en Esperanto ĉio lernenda estas io lerninda, kiu pliriĉigas nian esprimkapablon.

Iam, bona redaktoro de gazeto sendis al mi enketilon, sur kiu staris la jena demando: mi devis indiki per kruceto la nivelon de mia lingvoscio — "Mi regas Esperanton lege kaj skribe — perfekte — bone — mezbone". Mi post hezito, aldonis "ge" al "bone", markis ĝin per kruco, kaj skribis apude: "Neniu rajtas diri, perfekte!".

Sed ĉi tiu averto ankaŭ signifas, ke neniu devas stagni; ni ĉiuj povas progresi senfine. Se ni ne penas progresi, ni baldaŭ komencas malprogresi. Sed kiam ni konstante penas progresi, ni konstante ĝojas pro etaj novaj venkoj. Ĉiu el ni rajtas elekti: ĉu esti vera Esperantisto, aŭ nur ek-Esperantiginto; ĉu paroli Esperanton, aŭ "Esperaranton"; ĉu konstante krei por aliaj teĉojn, aŭ konstante meriti la ĝojon de etaj novaj triumfoj.

ADAGIÁRIO ESPERANTO- PORTUGUÊS ESPERANTA- PORTUGALA PROVERBARO

L.L. Zamenhof — A. Couto
Fernandes

0,24 ORTN



Brazila Kroniko

Brasília

Distrito Federal — En Februaro de la kurranta jaro, Esperanto-Asocio de Brasília (E.A.B.) okazigis kursojn por Esperanto-instruistoj gviditajn de Prof. Geraldo Mattos, membro de la Akademio de Esperanto.

En la kursoj partoprenis 50 homoj el 7 ŝtatoj. La Gramatika Kurso baziĝis sur la 600-paĝa "Gramatiko de Esperanto" verkita de Prof. Mattos.

Maranhão

São Luís — S-ro Gilson Villas Boas Passos, Sekretario de Associação de Esperanto de Maranhão, komunikis la novan adreson de la societo: Av. Mal. Castelo Branco, 605 s/225, 65000 São Luís, MA.

S-ro Passos ankaŭ informas pri la finiĝo de elementa kurso, en kiu sukcesis 10 gelerntoj.

Minas Gerais

Governador Valadares — Laŭ letero de S-ro Esaú Hosana Vieira, fondiĝis en la kurranta jaro Governador Valadares Esperanto-Klubo. Adreso: Rua Quarenta e Quatro, 139, 35.100 Governador Valadares, MG.

Paraíba

Campina Grande — "Kunigilo Esperanto-Klubo" vige laboras por Esperanto, dank' al la iniciato de la semideanoj Maria do Socorro Paz e Afonso Camboim. En la lastaj monatoj oni okazigis kursojn, programis prelegojn kaj ricevis intervjuon de la loka gazetaro.

Adreso de la Klubo: Caixa Postal 277, 58100 Campina Grande, PB.

Rio Grande do Sul

Porto Alegre — Jen la nova estraro de Esperanto-Societo de Porto Alegre por 1985-1987: Prezidanto: S-ro Ivo Sanguinetti; Vicprezidanto: S-ro Solon Flores Sant'Ana; Unua Sekretario: S-ro Zélia Co-

elho da Silva; Dua Sekretario: S-ro Balduino Egon Breitenbach; Kasisto: S-ro Itamira Gomide; Bibliotekisto: S-ro Alcides Cardia.

Rio de Janeiro

Rio de Janeiro — En "Jornal da Tijuca", n-ro 958, S-ro José Rabello de Paula publikigis informojn pri Esperanto kaj pri Brazilo Esperanto-Ligo.

En Marto pasinta, S-ro Rabello de Paula vizitis Lernejojn Laudimíia Trota kaj Francisco Cabrita, kie li faris prelegojn pri la Internacia Lingvo kaj organizis ekspozicion pri Esperantaĵoj.

Campos — En Aprilo Lasta, estis elektita jena nova estraro de Campos Esperanto-Klubo (Rua Tte. Cel. Cardoso, 821): Prezidanto: S-ro Joel Maciel Soares; Sekretario: S-ro Jayme Alves Patricio; Kasisto: S-ro Manoel Gonçalves S. Pereira; Dir. pri Instruado: S-ro Marta Ferreira Mendonça; Dir. pri Propagando: Edmar da Silva Rangel; Socia Dir. S-ro Elizabete Carvalho. Kontrola Konsilantaro: S-ro Vivaldo Marcelino da Silva, S-ro Rossini Viana Nunes, S-ro Kátia de Paula.

Niterói — Niterói Esperanto-Klubo (N. E.K.) sendis al Brazilo Esperanto-Ligo kopion de la raporto rilatan al 1984, dum kiu oni okazigis plurajn kursojn, prelegojn kaj kunsidojn.

Oni ŝuldas la fruktodonan laboron de N.E.K. en 1984 al la sindonaj estraranoj Joaquim do Couto, Balbina Ferreira kaj Emílio Ferreira.

Santa Catarina

